

La Biblio : ponto inter la kulturoj

enkonduka prelego en Görlitz, 10an de aŭgusto 2026

Antaŭ cent jaroj eldoniĝis la unua kompleta Biblio, en Esperanto, kompleta laŭ protestanta tradicio, en Edinburgo, Skotlando, kun oficiala inaŭguro en la katedralo Sankta Giles de la Skota Eklezio, de presbiteriana konfesio. Ĝin eldonis kune la Skota Biblia Societo kaj la Brita kaj Alilanda Biblia Societo (BFBS).

En 1977, dum la KELI-kongreso en Edinburgo, ni festis la jubileon de tiu Biblio, kun prokrasto de malpli ol unu jaro, en la sama preĝejo Sankta Giles. Mi pensas ke inter ni nur Bengt-Olof kaj mi ĉeestis.

En 2026, KELI kongresas denove por memori tiun eventon. Ni ne estas en Edinburgo, sed en Gerlico, Görlitz, Zgorzelec, urbo ĉe rivero, landlima urbo dividita per rivero inter du ŝtatoj, inter du lingvoj, inter du malsamaj kvankam proksimaj kulturoj.

Oni povas, malfacile, dialogi voĉe de unu riverbordo al la alia, sed per ponto oni renkontiĝas, fizike kaj spirite.

Pro tio, la estaro de KELI proponis kiel temon por tiu ĉi kongreso : La Biblio : ponto inter la kulturoj.

Pri la historio de la Biblio en Esperanto, vi certe aŭdos dum tiu kongreso. Vi ankaŭ povas legi el libro "Nia historio", kiu priskribas la historion de KELI de la komenco ĝis 1961.

Mi unue pritraktos la kulturon laŭ siaj diversaj aspektoj, poste la Biblion kaj fine kiamaniere la Biblio estas ponto inter la kulturoj.

La kulturo aŭ la kulturoj ?

PIV 2020 ne helpas en tiu distingo.

Se mi parolas insiste pri la kulturo, singulare kun la artikolo, tio rilatas al la personaj sperto kaj kvalito. Oni povas ankaŭ paroli pri klereco, edukiteco. Ĝi estas pli ol konoj intelektaj aŭ praktikaj, sed al tiuj konoj ligiĝas modeloj, valoroj kaj kreivo. La klera homo estas tiu, kiu vivas laŭ tiu kono. Ne sufiĉas konon de artoj kaj literaturoj, de sciencoj kaj teknikoj, de filozofio. La kulturo videblas per la konduto, per la alproprigo de tiuj konoj, de tiuj modeloj. La kulturo estas tiu "pli" kiu aldoniĝas al la naturo.

Sed, ne pri tiu kulturo mi volas paroli nun. Mi celas la kulturon de homgrupo, socio.

Tio estas la kunmeto de valoroj, kredoj, preceptoj, kutimoj, tradicioj kiuj estas komunaj al tiu aŭ al alia homgrupo. Ĉiu homgrupo, ĉu granda, ĉu malgranda, havas propran kulturon. Kaj, ĉar nuntempe, iu homo apartenas al diversaj homgrupoj, li vivas samtempe en diversaj kulturoj aŭ subkulturoj.

Ĉiu kulturo dependas de la mondpercepto kiu estas komuna al la grupo. Se mi identigas mondpercepton kun religio, mi povas diri kiel Paul Tillich : "Religio estas la substanco de kulturo kaj kulturo estas la formo de religio." Kaj kiam estas malsamaj mondperceptoj, tio kondukas al "kontraŭkulturoj" kiuj aperas en reago kontraŭ la kulturo de la plimulto, kontraŭ la kulturo sentata kiel premanta. "Kulturbatalo" estas la diktatoreca formo de kontraŭkulturo.

Venis al mi demando pri : "inter kulturoj" aŭ inter "la kulturoj". Mi ne refaros la gramatikan artikolon pri la artikolo. Estas diferenco inter kulturoj kaj la kulturoj. Sen la artikolo la signifo estas : iuj kulturoj kiam kun la artikolo la signifo estas ĉiuj kulturoj, validas pro ĉiuj. Mi eble aludos al specifaj kazoj sed la temo estas ĝenerale pritraktata,

La homo identigas sin en kulturo aŭ kulturoj. Mi reparolos pri tiu aspekto poste, kiam ni konstatas, ke identigo, identeco kondukas al distingo, disigo kaj fine ksenofobio, rasismo, malamo, ke multaj rifuzas agnoski la alian kiel homo, ĝuste ĉar li supoze ne dividas la samajn tradiciojn, la saman kulturon.

La Biblio. Sed pri kiu Biblio oni parolas ?

Ĉar, oni povas distingi plurajn Bibliojn laŭ la maniero pritrakti ĝin. Pli precize, mi komence ĉefe parolas pri la unua parto de niaj Biblio, kiu, kiel vi scias, havas malsamajn listojn kaj ordojn.

Unue, la hebrea Biblio, kiun ni havas en la hebrea originalo kaj specifa ordo : unue la Torao, poste la profetoj (*neviim*) kaj fine la skriboj (*ketuvim*). Estas kelkaj variaĵoj en la tekstoj, trovitaj antaŭnelonge dank' al la manuskriptoj de Qumran, Estas notinde ke la Samarianoj akceptas nur la Toraon, kun kelkaj diferencoj. Tiu hebrea Biblio finiĝas per nia 2a Kronikoj, kun la anonco de la veno de Ciro, la fremda reĝo kiu, obeante al Dio, liberigos la popolon. En la centro de tiu hebrea Biblio, en la centro de la kerno kiu estas la Torao, estas la revelacio de la nomo de Dio, kiun oni nepre ne prononcu.

Due, la greka (aŭ helena) Biblio, la Septuaginto, kiu estas traduko de la antaŭa kun pliaj tekstoj. Ili estas aranĝataj alimaniere, laŭ literaturaj ĝenroj. Ĝi finas per suplemento al la libro de Daniel, en peco kie la pagana reĝo agnoskas la universalecon de la Dio de Daniel. La neprononcata nomo fariĝis : "la Sinjoro".

Trie la t.n. Malnova Testamento de la kristanoj, kiu estas vidata kiel preparo, anonco de la veno de Jesuo Kristo. Ĝi finas per la profeto Malaĥi, kiu anoncas la revenon de la profeto Elija, komprenita kiel Johano la Baptisto. Ni ŝuldas tiun ordon al Hieronimo en lia latina traduko, la Vulgato, el la hebrea kaj el la greka por la tekstoj nur en tiu lasta lingvo.

Estas tamen almenaŭ tri versioj de tiu kristana Biblio :

la katolika, kiu sekvas la Vulgaton,

la protestanta, kiu sekvas la ordon de la Vulgato konservante nur la librojn konatajn en la hebrea, la ortodoksa, kiu krome inkludas aliajn librojn.

Kelkaj ekumenaj biblio havas alian ordon, nome la protestantan al kiu poste aldoniĝas la deŭterokanonaj libroj (la nur el la greka), ekzemple la antaŭlasta esperanta eldono.

Por ĉiuj kristanaj Biblio, la centro estas Jesuo-Kristo, en la "Malnova Testamento" kaj en la "Nova Testamento", Nova Testamento pri kio nune ĉiu kristana eklezio konsentas. Tiu Nova Testamento finiĝas per la anonco de la reveno de Jesuo-Kristo kaj de nova erao.

Kvare, la Biblio de la moderna kritiko. Pri ĝi, neniuj kerno, nek la neprononcebla nomo, nek la proklamita universaleco, nek Jesuo Kristo, nek iu ajn eskatologio. Universaleco estas nur proceso, evoluo de la homa historio, sen influo de iu transcenda estaĵo. Tiu Biblio enhavas nur kulturajn tekstojn el alia tempo, same kiel la aliaj tekstoj, religiaj aŭ eposaj, fikciaj aŭ filozofiaj.

Biblio en kulturo

Ĝuste, kiam mi denove parolas pri kulturo, ni ne devas forgesi ke la Biblio mem ekestis ene de iu kulturo, pli ekzakte ene de pluraj diversaj kulturoj, el diversaj kulturoj. Paul Tillich notis ke : "ĉiu ago de la spirita vivo de la homo estas portata de lingvaĵo, lingvaĵo parolata aŭ silenta,"

Preskaŭ neniuj plu diras ke la Biblio venas rekte kaj senerare de Dio mem, kiel ofte asertas multaj islamanoj pri la Korano.

Kion oni diru pri la genezo, la origino, de niaj bibliaj tekstoj ? Multaj teorioj kaj esploroj provas kompreni kiel tiuj tekstoj alvenis ĝis ni. Kelkaj bibliaj tekstoj havas aŭtorojn aŭ pseŭdaŭtorojn,

kelkaj tute ne. La nuna kompreno estas ke temas pri rakontoj kaj pripensoj kiuj estis unue buŝe transdonitaj kaj poste skribitaj kaj kopiitaj kaj fine agnoskitaj kiel bazaj tekstoj. Tio estas "teknika" kompreno. Ni retrovis aliajn tekstojn el la samaj epokoj, la samaj kulturoj, en formo de papirusoj, de pergamenoj, de argilaj tabletoj. Ĝis ilia retrovo, multaj el ili estis perditaj. Sed la bibliaj tekstoj daŭre pluvivis kaj pluvivas. Ili fakte atestas pri la kulturoj en kiuj ili naskiĝis, pri la kultura kunteksto de ilia verkado, sed ankaŭ pri la kultura kunteksto de la periodoj de la rakontitaj epizodoj, pri la kultura kunteksto de ilia kopiado, tradukado, ktp.

Tiuj tekstoj estis elektitaj, agnoskitaj, tradukitaj meze de diversaj kulturaj medioj, en diversaj regionoj, en diversaj lingvoj do tra diversaj kulturaj esprimoj. Oni povas kompari kun la arkeologiaj kaj filologiaj eltrovaĵoj. Pri la elekto de la listo de tekstoj nun agnoskataj, mi jam parolis. Ankaŭ tiu elekto estis portata de kultura kunteksto.

Tamen, laŭ la vidpunkto de kredanto, la demando estas alia. Oni parolas pri inspiro de la aŭtoroj, skribistoj kaj kopiistoj. Homoj volis klarigi kion ili kredas. Ili faris tion per la kulturaj rimedoj de la epokoj, per rakontoj, poezio, himnoj, juraj tekstoj, ktp, kaj per lingvoj. Aliaj homoj taksis tiujn tekstojn valoraj kaj kopiis ilin. En tio, la kredantoj vidas la intervenon de la Spirito, sed ne kiel diktaĵo.

Efektive, la tekstoj de la Biblio estas respegulo de la fido de la diversaj aŭtoroj, sed ili estas ankaŭ respegulo de la tiamaj kaj tieaj kulturoj.

Aŭtoritata Vorto de Dio ?

Kiam mi diras tion, mi levas demandojn. Ĉu kaj kiel oni povas nomi la Biblion "Vorto" aŭ "Parolo de Dio" ? Kial kaj kiel ĝi estas aŭtoritata ? Ĉu tiu aŭtoritato estas fina, lasta, kompleta ?

Kelkaj jam uzis la jenan esprimon : La Biblio estas enkarniĝo, mi mem aldonus "enkulturiĝo" de la Vorto aŭ Parolo de Dio.

Ĝi estas vorto, parolo de Dio, ĉar per ĝi Dio parolas. Dio parolas al la homoj. Al Abrahamo, Moseo, la profetoj, ktp. En la rakontoj, Dio rekte aŭ sonĝe parolis al ili. Per tiuj rakontoj kaj per aliaj bibliaj tekstoj, Dio parolas al tiu kiu kredas, al tiu kiu aŭskultas la skribitajn vortojn. Tio eblas, por la kredanto kompreneble, nur dank' al la Sankta Spirito, tiu sama Spirito kiu "inspiris" la aŭtorojn kaj la diversajn posteulojn. Paroli estas efektive blovi. Tamen Dio ne krias, temas pri la murmuro de fajna silento, kiel al Elija. Oni ne aŭskultas la voĉon de Dio en la bruoj. Legado kaj preĝo estas renkontiĝo kaj konversacio kun Dio. Mi poste parolos pri tio.

Jesuo mem estas Vorto, Parolo, *Logos*. Kiam oni aŭdacas diri ke la Biblio estas enkarniĝo de la Vorto de Dio, oni ne diras ke la Biblio estas adorenda kiel Dio. Ĝi simple portas la mesaĝon, la voĉon, la parolojn de Dio, ne rekte sed tra homoj, kadre de kulturoj, per vortoj kaj frazoj.

Tradukado

Ĉar tre malmultaj kapablas legi la Biblion en la "originaj" tekstoj, en la "originaj" lingvoj, ni bezonas tradukojn. Eble eĉ niaj "originaloj" estas jam tradukoj.

Ĉu traduko estas perfido, kiel oni diras itale *traduttore traditore* ? Povas esti, sed denove la kredanto kredas je la inspiro de la tradukistoj.

Estas pluraj manieroj traduki, kaj ankaŭ specife la Biblion.

La traduko laŭlitera celas resti tre proksima al la originalo, kun la granda risko de kultura disiĝo, interspaco, kiu alportas miskomprenojn.

La traduko dinamika volas kuntekstigi, traduki ne nur la vortojn sed ankaŭ traduki la kulturajn aspektojn. Ĝi tiel foje malproksimiĝas de la vortumo de la originalo.

La leganto de la unua traduko devas trapasi la valon por bone kompreni kaj al la leganto de la dua traduko la tradukisto ofertis ponton.

Tamen, eĉ se tre bona lingvisto, bona konanto de la du lingvoj, de la fonto kaj de la celo, la tradukisto portas ankaŭ sian propran kuntekston, sian idearon. Se li ne tro atentis pri tio, povas rezulti orientita traduko. La plej konataj en tiu direkto estas la tradukoj de la atestantoj de Jehovo, foje bonaj sed pli ofte laŭdogmaj.

Por eviti tion, pli kaj pli publikiĝas ekumenaj versioj, en kiu partoprenas tradukistoj de diversaj konfesioj. Ili devas inter aliaj streboj trakti tiklajn pecojn.

Lingvoj

La Biblio, kiel la aliaj tekstoj, estas esprimita en lingvoj.

Eble, vi scias ke la lingvistoj distingas inter lingvo kaj parolo, inter komunikilo kaj mesaĝo. Kiel notis Tillich, "la lingvaĵo estas la fundamenta kultura kreaĵo."

La parolo, la mesaĝo estas portata tra lingvo, tra komunikilo. Kaj lingvo, komunikilo apartenas al kulturo, al kulturoj, portas ankaŭ la kulturon, kiel ankaŭ faras la diversaj artoj. Lingvo estas komplete plektita kun kulturo,

Por pluirigi la vortojn, la parolon, la mesaĝon, oni inventis la skribon. Ĝia unua efiko estis faciligo de komunikado. Ĝi ankaŭ iel fiksas la lingvojn.

Same kiel literaturo, la bibliaj tradukoj tre ofte fiksas la lingvojn. Estas multaj ekzemploj. Se Dante konsistigis la italan, la bibliaj tradukoj fiksas la nederlandan. Eĉ, el la diversaj dialektoj de la germana Luther plejparte konsistigis la komunan germanan lingvon en ĝia skriba formo. La historio de la franca lingvo estas pli komplika, sed en ĝi ankaŭ rolis Jean Calvin, sed ne per biblia traduko sed per teologia traktato, *"Institution de la religion chrétienne"*.

Legado

La Biblio estas teksto kiun oni ne legu kiel romanon, unue ĉar ĝi ne estas romano. Ĝi kunigas diversajn literaturajn ĝenrojn : rakontoj, poezio, filozofio. Ĉiu el ili postulus malsamajn manierojn legi. Kaj kiel mi jam diris, ĝi kunportas kulturajn elementojn, ili kunportas kulturajn elementojn. La unuan ŝtupon en la legado de la Biblio oni nomas ekzegezo, tio estas eltrovo de la signifo, de la vortoj kaj ankaŭ de la kulturo ĉirkaŭ ili.

La posta ŝtupo, almenaŭ por kredanto, sed ne nur, estas interpreto, hermeneŭtiko. Tio validas ankaŭ por aliaj kulturaj tekstoj kaj simboloj kaj ritoj. Tio estis la fako ekzemple de Mircea Eliade kiam li studas la historion de la religioj.

Tiuj ŝtupoj ne necese postulas fakulojn. Ekzistas helpiloj.

Eblas ankaŭ aliri al la teksto, tia kia ĝi estas antaŭ la leganto. Legado kaj preĝo estas por kredanto maniero renkonti kaj konversacii kun Dio. Estas aŭdi, aŭskulti Dion en la Skriboj. Tiam ĝi estas la Parolo de Dio. Tiun tekston la kredanto primeditu, eĉ "primaĉu". Tia legado estas de multaj nomata "dia legado", *lectio divina*.

Proklamado (homiletiko) de la mesaĝo estas alia afero. Ĝi postulas kaj ekzegezajn kaj hermeneŭtikajn. Tio estas la tasko de la predikistoj, profesiaj aŭ ne. Sed alimaniere ĝi estas ankaŭ la tasko de ĉiu kredanto, atestanto, disĉiplo de Kristo. Ĝi estas la lasta fazo de la transdono de la Evangelio dank' al la Sankta Spirito.

Evangelio kaj kulturo

Diversaj aŭtoroj pristudis la rilatojn al kulturo. Mi mencias inter ili Paul Tillich, Richard Niebuhr kaj Leslie Newbigin, Sed iliaj titoloj prezentas diversajn vidpunktojn, Eklezio kaj kulturo, Evangelio kaj kulturo, Kristo kaj kulturo. Oni ne nur pritraktas la nuna situacion, sed ankaŭ la antaŭajn tempojn. Proklami la Evangelion ene de unu kulturo estas ĉiam defio. La Evangelio originis en tute alia kulturo, mi eĉ devus diri ke ĝi originis en aliaj kulturoj, malsamaj. Jam tion oni vidas en la Nova Testamento, kiam Paŭlo predikas en la nuna Anatolio, en la grekaj urboj kaj en Romo.

Aspektoj de loka kulturo povas kongrui kun la Evangelio, kaj aliaj povas kontraŭi ĝin. Uzi la komunajn elementojn por konstrui kunigajn pontojn sen viŝi la fortajn trajtojn de la kristana fido, tio estas la tasko de la kristanoj, de la predikistoj, de la Eklezio. Enkulturi la mesaĝon de la Evangelio sen nuligi ĝin estas unu vojo al evangelizado. Kelkaj preferas unue batali kontraŭ la kulturo kiun ili alfrontas. Ĉu la kristanoj distingiĝu kaj disiĝu de la ĉirkaŭanta kulturo aŭ ĉu la kristanoj adaptiĝu sen rezigni pri la fundamentoj ?

En la daŭro de la du jarmiloj de la kristana Eklezio, oni provis plurajn sintenojn, enkulturiĝon aŭ kulturan batalon. Laŭ mi, la ĉefa eraro estis devigi ĉiujn iri sub la jugo de la tiel nomata "kristana kulturo", eĉ ne-kredantojn.

Du generacioj de misiistoj malsame agadis pri la lokaj kulturoj. La unuaj volis simple viŝi la lokan kulturon, kiam la nunaj estas pli zorgemaj. Ekzemplo estas la pritraktado de poligamio.

La kulturo de kristanismo, la kulturo de la Evangelio, se oni volas difini ĝin, estas la kulturo de la bendiroj (beatecoj) de la surmonta prediko. Oni ankaŭ legu el la epistolo al la Galatoj : *La frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezemo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado. Kontraŭ tiaj ne ekzistas leĝo.* Jen bona difino de la kristana kulturo. Tiel la kristanoj diferenciĝas. Tiel ili atestas pri la mesaĝo de la Biblio, de la Evangelio.

La Biblio kiel kultura ponto

Parolante pri Biblio kaj kulturo oni plilarĝigas la fokuson. Mi nun flankenlasas la teologian aspekton de la Biblio.

La Biblio estas unu el la ĉefaj homaj literaturaj verkoj. Malsame al multaj aliaj antikvaj verkoj, ĝi ne havas nur unu aŭtoron aŭ pseŭdaŭtoron. Ĝia literatura varieco estas ankaŭ rimarkinda. Ĝi estas fakte biblioteko. Ĝia greka nomo "*ta biblia*" estas pluralo, "la libroj". La multaj rakontoj en ĝi estis fontoj por verkistoj ĉirkaŭ preskaŭ la tuta mondo. La itala verkisto Umberto Eco diras ke la Biblio estas "malfermita verko". Mi havas hejme dikan enciklopedion kiu nomiĝas "La Biblio en la literaturoj de la mondo". Ĝi havas pli ol 2300 paĝoj. Mi povas citi la francojn Pierre Corneille kaj Jean Racine, la hungaron Imre Madách, la italon Dante Alighieri, la polon Adam Mickiewicz aŭ la germanon Rainer Maria Rilke, ktp, ktp. Ilia kunteksto estas grandparte komprenebla de homoj el alia lingvo, alia kulturo, kiam tiuj legas tradukojn.

En la tekstoj de kelkaj britaj verkistoj videblas la mesaĝo de la Evangelio, rekte aŭ alude. Mi pensas pri John Bunyan, C. S. Lewis kaj J. R. R. Tolkien. Mi legis studon pri "la Evangelio laŭ Tolkien".

La Biblio estas ankaŭ fonto por la diversaj artoj, pentrarto, muziko, ktp.

Fakte la Biblio estas preskaŭ universala elemento en antaŭaj kaj nunaj kulturoj. Ĝi estas kiel ĉenponto inter la literaturoj, la kulturoj.

La problemo kun tiuj kiuj volas forviŝi la Biblion el la kultura pejzaĝo estas ke, nun, multaj homoj ne plu komprenas gravajn artaĵojn. Kaj ke multaj ne plu kapablas, eĉ ne provas, kompreni la kulturon de aliaj. Forviŝante la Biblion de la kultura grundo, oni detruas la ponton, kiu kunigis tra la Biblio la kulturojn.

Identeco

Etnologoj studas la kulturojn de homgrupoj ekster la "civilizita" mondo kiam sociologoj studas la socion de la "civilizita" mondo. Tiu falsa rigardo al nia mondo feliĉe ne plu validas. Per metodoj ĉu samaj, ĉu malsamaj, etnologoj, sociologoj, kulturaj antropologoj studas homgrupojn kun siaj mondperceptoj, valoroj, moroj, legendoj, ritoj, ktp, ktp. Ĉiu civilizacio, ĉiu kulturo havas sian valoron. La edukita, kulturiĝinta homo komprenis ke neniu estas pli valora ol la alia, tra la lokoj, tra la tempoj.

Ĉiu homo per sia kulturo, per sia lingvo, per la historio de sia grupo, sentas sian identecon.

Tamen, ĉiu homo fakte apartenas al pluraj kulturoj, eble parolas ankaŭ dialekton aŭ sociolekton (profesian aŭ generacian ĵargonon), praktikas arton aŭ sporton, ktp. Ĉiu homo estas mozaiko kultura.

Mi ankaŭ mencias la kazon de la t.n. trikulturaj personoj. Ili vivis en du landoj, meze de du kulturoj kaj konstruis al si trian kombinitan kulturon. Tio estas ekzemple la kazo de infanoj de diplomatoj aŭ misiistaj paroj. Estas la kazo de ekzilitoj kaj de iliaj infanoj. Ili sentas sin plene anoj de ambaŭ kulturoj. Ekzemple la libana kaj franca aŭtoro Amine Maalouf diras ke li estas "cent procente franco kaj cent procente libanano". En ili mem estas ponto inter du aŭ pli kulturoj. Mi ankaŭ pensas pri verkistoj kiuj verkis en du aŭ pli lingvoj, kiel Milan Kundera aŭ Samuel Beckett.

Ni devas kompreni ke identeco kaj kulturo, se ili diferencigas homojn, nepre ne indikas relativan valoron. Ĉiuj estas egalvaloraj, egalrajtaj.

Pli, Paŭlo, denove en Galatoj, konstatas ke : *ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina.*

Pontoj aŭ muroj

Tio signifas ke ni nepre ne konstruu fizikajn aŭ mensajn murojn inter homoj, inter kulturoj, sed prefere ni konstruu pontojn. Kaj inter la fostoj, la pilieroj de tiuj pontoj troviĝas la Biblio, ĝia savmesaĝo, la Evangelio, ĝia riĉeco kultura kiun ĝi lasis al la homaro por dividi.

Ĉe ambaŭ flankoj de tiu ĉi-tiea rivero troviĝas preĝejoj kie oni legas la saman Biblion, troviĝas homoj kiuj vivas sub la sama ĉielo en similaj domoj. Tamen ili parolas malsamajn lingvojn, havas kulturajn diferencojn. Ĉu tio sufiĉas por disigi, por instali murojn ? Sur ambaŭ flankoj de tiu ĉi rivero instaligis homoj el foraj kulturoj, el foraj lingvoj, el malsamaj kutimoj. Ĉu antaŭ ili meti murojn, barilojn ? Nepre ne. Denove la Biblio aldonas foston al nia ponto : *Se ekloĝos ĉe vi fremdulo en via lando, ne premu lin. Kiel indiĝeno el inter vi estu por vi la fremdulo, kiu ekloĝis ĉe vi, kaj amu lin kiel vin mem. (Lev 19:33-34).*

La Biblio estis ponto inter la kulturoj ekde sia origino, dum sia disvastiĝo dank' al multaj homoj, inspiritaj de la Spirito, kaj tiu ponto peris la universalan mesaĝon de la Torao de Dio kaj de la Evangelio de Jesuo Kristo.

La Biblio estas ponto inter la kulturoj ĉar ĝi kapablas trafenetri ilin, ĝi kapablas evoluigi ilin. Ĝi instigu nin ankaŭ konstrui pontojn inter la homoj per niaj etenditaj malfermitaj brakoj.

Mi dankas